Kontraŭflua ideo
Kion imposti

Nepras partopreno de loĝantoj al komunaj elspezoj por organizi socian vivon. Ideale, ĉiu devus paĝi laŭ sian riĉeco kaj ricevi laŭ siaj bezonoj. Klare, ĉiu ajn rapide rimarkos ke mi estas nek ekonomisto, nek fako pri financo, kaj neniun komprenas pri tiaj tiel kompleksaj aferoj. Tamen, mi estas sufiĉe jaraĝa por esti kolektinta pripensadojn pri nia monda organizado.

Antaŭ la lasta mondmilito mi estis partopreninta, dum lernejaj ferioj, al la vivo de kampuloj en la aŭvernja montaro. Mi helpis ilin fojni mane per granda ligna rastilo, poste oni falĉis sekalon per simpla maŝino tirata de bovinoj. Mi kunigis garbojn, kiujn mi cirkaŭligis per malpleno da tigoj, tordnoditaj sub iliaj spikoj. Ni ŝarĝis ilin sur lignan ĉaregon, kiun bovinoj tiris al la garbejo.

En tia montaro la vintro tiam longe daŭris. Kampuloj ne estis riĉaj, kaj vivis tre aŭtarcie. Ili malofte manĝis viandon. Ĉiu jaro, automne, oni buĉis porkon. En la ĉiam aerata subtegmento estis ia granda kaĝo, la "karnejo", kie staris tablo, sur kiu oni sternis la "mantelon", t.e. la haŭton kun tre dikan tavolon de klara lardo. Oni kovris ĝin per salo, poste oni surmetis pecojn de viando, kovritaj per salo. La peklitaj ŝinkoj estis kudritaj en tolo. Ĉiu sekiĝis sekure en la malvarma seka aero je pli ol 1000 m alteco. Oni manĝis la lardon kun brasikoj kaj terpomojn. Dimanĉon, iafoje kokidon.

Post la morto de gepatroj, la filo foriris urben, forlasanta la domon, kiu ruiniĝis. Oni ne plu aŭdos lian fortan voĉon ordoni la hundon revenigi bovinon, en la loka lingvo " *Ĉii, vee la kajre, vee la kajre "*, ĉar tie ne plu paŝtiĝas bovinoj, eĉ ne plus ekzistas gresejoj nek kampoj, ĉie kreskas arbaro, kaj lupoj revenas.

Tiam kampulo neniam vendas sian domon, sian garbejon, sian kampon, siajn bovinojn. Li uzas, manĝas siajn produktojn. Li vendas parton kaj, se eblas, ŝparas monon por alfronti riskojn. Do lia posedaĵo havas du funkciojn, pasivan kaj aktivan.

La pasiva posedaĵo.

Tiu konstituas ŝirmejon, protekton kontraŭ riskoj de la vivo, t.e. la domo kaj, sub matraco, lana ŝtrumpo, kie li kolektas la orajn monerojn de ŝparado. Tiu estas **morta posedaĵo**. La posedanto nenion enspezas el ĝi, li nur elspezas por ĝi. Konstrui la domon kostis, poste bonteni, ripari ĝin, plibeligi eĉ pligrandigi, hejti kaj nun izoli ĝin. Plie, tia posedaĵo riskas katastrfojn, brulegon, ŝtelon. Ĝia mona valoro fluktuadas laŭ la merkato. Oni povas precize taksi ĝin nur kiam oni vendas aŭ translasas ĝin.

La aktiva posedaĵ

Tiu estas finfine mono investita por produkti. Ĝi estas parto de la eterna movo de la vivo. Oni aĉetas kampon, oni semas, tio kostas. Sed oni vendas sian rikoltaĵon, kio produktas monan enspezon, do eble profiton. Tiel kreiĝas senĉesa varia flukso da mono, kiu nutras la socion. **Nur tiu posedaĵo produktas monon**.

Imposti posedaĵojn

Ne ĉerpu el la cisterno dum la fonto ankoraŭ fluas [1]

La pasivan posedaĵon

En Francujo ekzistas imposto sur domoj. Ĝi estas tre populara, ĉar bela domo estas videbla simbolo de riĉeco, insultanta tiun, kiu loĝas subtegmente. Sed tia imposto malinstigas konstrui loĝejojn. Ĉu ĝi estas racia, kiam tiom da homoj malfacile trovas loĝejon, aŭ kies domo falegis pro malbonteno ? La Ŝtato kapablas konstrui loĝejojn dank'al impostoj, sed tiuj-ĉi ne estas celitaj. ili iras en la ĝeneralan budĝeton. Pro ŝparado, oni rapide konstruos kelkajn malbelajn domegojn por loĝigi luprezete multe da malriĉuloj, neniam belajn solidajn domojn. Ĉu la civitanoj ? Neriĉa civitano tamen iafoje sufiĉe enspezas por ke banko akceptas atribui al li prunton, kiun li repagos dum 20 jaroj. Certe li elektos konstrui kiel eble plej grandan, belan kaj solidan domon por sia propra vivo. Kiam li mortos, la loĝejo restos. Nun tie loĝos kelkaj malriĉaj familioj, eĉ enkrakistoj. Posedi nepre estas portempe. Bela solida domo estas fakte **nacia ŝirmenda posedaĵo**. Imposti ĝin estas malinstigi ke oni konstruos kaj bontenos domojn. Tiu riĉeco konstituas la ĉarmon kaj la logon de francaj pejzaĝoj kaj urboj. Tia pasiva posedaĵo estas la frukto de ŝparado de lando, el profitoj estigitaj de aktiva mono; kiuj jam pagis oimpostojn. Ĝi estas potenciala riĉaĵo, eventuale mobilizebla per pruntoj en okazo de katastrofoj. Tiel, la francanoj amase akceptis ŝanĝi sian oron kontraŭ bankbiletoj je la komenco de la milito en 1914 [2]. Kial ŝparema avarulo, kiu elpezas kiel eble malplej multe, kaj kaŝas sian oron en truo de sia muro, kie iu ajn trovos ĝin post kelkaj jarcentoj, estus tia socia parazito, kiu nepras senposedigi ? La respondo estas ke li estas la plej granda malamiko de la konsumado, kiu bazas nian nunan ekonomion.

La aktivan posedaĵon

La plej granda parto estas mono, kiun oni investas por gajni monon. Se oni ludonas loĝejon, tiu pasiva posedaĵo estiĝas aktiva. Aktiva mono donas potencon al posedanto, por orienti aktivecon.. Nature, imposti ĝin pligrandigas konsumerismon, ĉar instigas riĉulojn elspezi, konsumi, por malpli pagi al la ŝtato [3]. Aliflanke, tio multe bremsas produktadon, necesan ambaŭ por ebligi la vivon kaj profitdoni. Do ŝajnas al mi ke imposti la investitan monon estas ankaŭ eraro, kvankam malpli da aktiveco estas bona por la Tero..

Imposti la fonton

Imposti profiton ŝajnas al mi la plej logika kaj saĝa maniero kolekti monon por la socio.

Produktado respondas petadon de konsumantoj, tre ofte artifike stimulata de oferto apogita sur reklama turmentetado. Ĝi dependas de la kvanto de investita mono. Ĝiaj estigitaj profitoj konstituas la nuran naturan monfonton el kiu elpreni impostojn. Ĝi estas neelĉerpebla dum pluas aktiveco. Nur profito devus financi la kutimajn bezonojn de socio, kia ajn estas ĝia deveno.

La Ŝtato kolektas la monon de impostoj. Ĝi ideale devu uzi ĝin por la komuna bonstato kaj intereso. Ve, prosperegaj entreprenoj produktas nur revaĵojn, kiuj detruas la medion, sen tamen havigi neprajn bezonojn al la malriĉulojn. Ekzemple, la plejmulto ne uzas la tutajn kapablecojn de sia telefono sed, por instigi ŝanĝi ĝin, la firmaoj kreas novajn eblecojn, kiujn ne estos pli uzotaj ol la malnovaj.Oni konstruas poluantegajn krozadŝipegojn, kiuj ŝutadas amasojn da turistoj sur mirindajn lokojn, kiujn ili tuinigas. Ili multe pli profunde lernus en sia fotelo, televidante bonan dokumentan filmon.

La salajraj diferencoj estiĝis nedecaj. La popolo malbone toleras ke estiĝas egajn riċecojn, kiuj lerte evitas kontribui al kolektivaj elspezoj kaj investoj. Internaciaj firmaoj subaċetas politikistojn por havi favorajn decidojn. Iliaj estroj kapablas posedi luksajn jaktegojn kaj

palacojn en malproksimaj belegaj insuloj. Mirinde, ili ne instigas hontforĵetadon, sed male estas admirata, kun ilia foto sur la kovrila paĝo de magazinoj.

Ideala laŭenspeza imposto esta supozata elpreni kvoton proporcie al la kontribua kapablo de ĉiu. La franca prezidanto François Hollande estis decidinta elpreni 75%-n el la parto de jara enspezo superanta unu milionon da eŭroj. Tiu decido estis rigardita kiel netolereblan senposedigadon kaj estis forĵetita. Kial civitano, kiu ne povas eĉ revi pri tiaj salajroj, povus konsenti ke akumulado de taksoj kaj diversaj nepraj elspezoj manĝetas lian vivnivelon, sen kaŝita ribelsento, kiu kapablas iam ie eksplodi ?

Ekologio, kaj imposti aktivecon

La Homo estas invadema specio. Ĝi ne plu havas naturajn malamikojn : la grandaj sovaĝbestoj preskaŭ tute malaperis, la medicino kontraŭas epidemiojn, kaj militoj estas ankoraŭ malkapablas superforti ĝian multiĝadon. La plej grava minaco por pluvivo de la homa specio estas la akcelita kreskado de la monda loĝantaro. Neprus bremsi ĝin, ĉar laTero ne povas daŭre toleri la damaĝojn de tia homa aktiveco. Tamen kiel instigi malsategajn loĝantaron konduti maltusane, kiam ilia deziro konsumadi pligrandigas dum religioj disvolviĝas, kiuj predikas *kresku kaj multiĝu* ?

Eĉ riĉa kaj instruita socio kiel la nia,deziras ĉiam pli konsumi, sen konsideri la efektojn surla medio. Karbona takso, kreskigo de dizelolea prezo kaj deziro de pli granda aĉetpovo eksplodigis la postulojn de la *Flavaj Vestoj* franca ribelo. La procento de malriĉuloj en nia lando pligrandiĝas. Ili ofte estas solaj virinoj kun infanoj, kiuj ne havas certan laboron kaj loĝejon. Urĝas ke ili povos gajni decan vivon. Ili suferas de ekscesoj de socio, kiu orientas sian aktivecon al superflua produkto, je la kostopago de kio estas necesa. Neprus inversigi tiun prioritizaton.

Aktiveco estigas profiton, kiu estas la generala motoro. Imposti profiton eblas orienti aktivecon por havigi al ĉiuj elĵetituloj pli bonan vivon en deca loĝejo, Ĉefe la plimulto el ili estiĝis senlaboruloj pro maŝinoj, kiuj profitdonas multe pli ol homoj, dank'al ĉipa energio. Retmendado antataŭas komerciston, baldaŭ la retkonsulto anstataŭos kuraciston kaj roboto la flegistinon. Grave imposti tiajn profitojn, kiuj detruas humanecon, estigis pli konkurivan la homan laboron, necesan al ekvilibro kaj bonfaro de la socio. Plie, oni povus malpli grave imposti profitojn de aktivccoj, kiuj indulgas la Teron, ol tiujn uzantajn multe da fosilia energio.

La perforto de la flavvestribelo en francujo dum la finjaraj festoj multe damaĝis la komerciajn entreprenojn, ĉefe pri lukso kaj turismo Tiel oni povas mezuri la pezon de la superkonsumado en la monda ekonomio, kaj la ekvilibrŝanĝojn, kiuj neprus, se oni vere deziras malgrandigi la efektojn de aktiveco de la Homo sur lia propra pluvivo sur la Tero.

Kompreni imposton eblas pli facile akcepti ĝin, ĉefe se ĝia elpreno estas simpla. Kia ajn estos la maniero kolekti la publikan tresoron, la vera problemo estas ke la mono estus redistribuita por la komuna intereso laŭ la leĝoj kaj kontroloj de demokratio. Oni ŝatus ke ĝiaj elektoj estas pli saĝaj, kaj malpli sensivaj al potencaj industriaj kaj komercaj premgupoj.

Utopio ?

Referencoj

1.- Proverbo el sekegaj landoj, tute apokrifa
2.- https://www.loretlargent.info/or/lor-evince-durant-la-premiere-guerre-mondiale-histoire-de-lor/1588/
3.- Dum la dua mondmilito, kiam oni decidis trinki la vinon restantan en la botelo, eĉ kiam oni ne vere bezonas, oni ofte diris : " Tiu la germanoj ne havos"